

L'ALVOKO

OFICIALA ORGANO
DE LA KEBEKA ESPERANTO KLUBO

No 14
29an de julio 1964

L'ALVOKO salutas vin, estimataj gesam-
deanoj, ĝie ajn kie vi ripozas, sur la om-
brita balkono de la urbo, sur la longa sego
de la pazono, sur la fresa hamako, malfer-
mita al vento kaj sunradioj.

L'ALVOKO venas al vi, en vian hejmon, post
via kutima laboro, en la ĉiutaga ornamo de ka-
regaj personoj.

L'ALVOKO volas akompani vin, revivigante
feliĉajn momentojn, kiel tiuj kiujn vi konis
dum tiu lasta studjaro en viaj renkontoj kaj
en viaj esperanto-libroj.

Ni havas bonegajn novaĵojn por vi. ...Ni
atendas la viajn!

Ĝojajn feriojn!

Via publicisto.



La Estraro de la Kebeka Esperanto-Klubo

AUBE, f-ino Marcelle: sekretariino-kaŝistino de la KEK. Ŝi laboras por la Kebeka Registaro, kiel sekretariino de la "Prêt agricole" oficejo.

Adreso: 139, Crémazie ouest, Québec. Tel.: 522-4621.

BEAUPRÉ, s-ro Vincent: direktoro de la KEK. Li estas reprezentante por la "Brique Citadelle, Limitée".

Adreso: 738, Clairmont, Sainte-Foy, Qué. Tel.: 653-3052.

BOLDUC, Vianney, f.e.: publicisto. Profesoro en Nevicejo.

Adreso: 1012, boulevard Sainte-Anne, Québec. Tel.: 663-9133.

BRUNELLE, s-ro Henri: prezidanto de la KEK. Li estas agronemo kaj estras en la "Prêt agricole", de la Agrikulturo-Ministerio.

Adreso: 1031, avenue Brown, Québec. Tel.: 527-1692.

DORÉ, s-ino Yvette: vic-prezidantino de la KEK. Jam de tri jaroj ŝi multe laboris por arganizi nian Esperanto-Klubon.

Adreso: 1261, Ernest-Lavigne, Sillery. Tel.: 681-1742.

GINGRAS, s-ro Jean-Marie: bibliotekisto de la KEK. Industriisto.

Adreso: 555, rue Sainte-Marguerite, Québec. Tel.: 524-0670.

MELANSON, s-ro Eugène: direktoro de la KEK. Li estras la reklamaciejon de la "Prévoyance".

Adreso: 717, Saint-Cyrille ouest, Québec. Tel.: 527-3548.

RONDEAU, s-ino Jean-Marcel: asistantino-sekretariino-kaŝistino de la KEK.

Adreso: 975, avenue Casot, Québec. Tel.: 683-7071.

- - - - -

GRATULOJN! GRATULOJN! GRATULOJN!

---La 27-an de junio, s-ro Vincent Beaupré gajnis la unuan premion en oratora konkurso dum la Kanada Esperanto-Kongreso, en Oŝveo.

---La 1-an de julio, s-ro Henri Brunelle estis elektita dua vic-prezidanto de la Agronemo-Korporacio de nia Provinco dum kongreso de tiu asocio en Rouen.

---La 5-an de julio, s-ino Cécile Lavallée naskis tre belan filinon nomatan Nathalie.

---La 6-an de julio, s-ro Noël Deré ĉeestis la internacian kongreson de la Terpome en Alberta, kiel delegito de la Provinco Kebeko.

- - - - -

Ottawa Kongreso
.....

Brile sukceso estis ĉi-jare la kongreso de la K.E.A. al Kastelo Laurier en Ottawa dum la lasta semajno de junio.

Spite de la bedaŭrinda fakto ke la prezidanto de la K.E.A. ne ĉeestis, la aliaj membroj de la estraro bone laboris kaj ili meritas niajn sincerajn gratulojn.

La prezidanto de la Ottawa grupo kaj liaj helpantoj ankaŭ meritas niajn komplimentojn kaj niajn bondezirojn pro sia granda laboro kaj sia sindonemo.

Ni ne povas forgesi la kapablecon de S-ro OhUiginn, inda disciplo de Zamenhof.

Nia loka Asocio, la Kebeka Esperanto Asocio, estis bone reprezentita. Dek kvar Kebekaj membroj ĉeestis kaj ĉiu bone amuziĝis kaj ĉiu ŝajnas kontenta pri tĉu kongreso kie ni estis bonkore akceptitaj de la estraro de K.E.A. kaj de la loka kongresa komitato.

S-ro Vincent Beaupr e bone sukcesis en la oratora konkurso; fakte li gajnis la unuan premion. Pro tiu grava afero mi gratulas lin en la nomo de nia grupo kaj en mia modesta nomo, ĉar estas granda honoro por nia Kebeka grupo.

La Esperanto movado rapide kreskas en nia urbo, en nia lando kaj mi estas certa ke se vi bone studas, ofte parolas kaj ĉiuokaze partoprenas en ĉiujn Esperantajn movadojn, vi havos multe da plezuro kaj vi estos kunhelpantoj al sukceso de tiu mirinda samideana lingvo.

Longtempe vivu nia kara lingvo kaj nia Kanada grupo.

E. R. MELANSON.

- - - - -

La Estraro kunvenas...
.....

La 4-an de julio, la K.E.K. estraro kunvenis ĉe ges-roj Jean-Marcel Rondeau, Lac Saint-Joseph. Ĉeestis al la diskutado nia prezidanto S-ro Henri Brunelle, s-inoj Yvette Dor e, C ecile Lachance, J.M. Rondeau, s-roj E. Melanson, V. Beaupr e, J.M. Gingras kaj Frato Vianney.

Pli malfrue oni anoncos al vi la detalojn de la gravaj decidoj... Multan dankon al S-ro R. Rondeau, al ges-roj J.M. Rondeau, kiuj nin tiel afable akceptis.

Ĉeestinto.

- - -

Fri DIVIDO

En l'ALVOKO-12, vi eble malfacile tradukis la tekston DIVIDO. Mi tiam provis enigluon, kiun mi ŝatus hodiaŭ klarigi. Estas ĉusenca poemo: la unuan sencan vi eltrovas dum la unua legado. Sed jen la dua kaj vera signifo.

D I A V I D O
" "

Sur lian timpanon resonas turo da kuloj
Balo da cimoj sen cimbaloj:
Pano de timo kun gusto de lano
Tero de pano, demone de mono.

Li dolare deloras.
Oni amputis de lia animo ion:
Puto da amo, maro de rose,
Kie ne loĝas mito de mare.

Li tre manĝis tian koton de mare,
Kiel alo da kanoj li mergiĝis
Kaj li sekigis:
Li nur estas seka rete.

Li serĉas brikon da lumo,
La lumon de velo;
Li serĉas valon de kono,
Tiu vojo de kono, oro de tero;

Li serĉas ardon de koko,
Bone kara kiel era kolo,
Li velas la benon de amo.

Li ne estos nur kiel tiu kiu ete amas,
Li farigos ase de amo:
Bela done de neto de koro,
De lia koro tuta.

Li forlases la tulajn lipejn,
Tiuĵ etaj dioj, piaĵ astroj.

Kiel dia kono en diakono brilegos,
En tiu amanto de Die diamanto trembrilos.

(Al: Liliputa puto da lilioj)

Erato Vianney Belduc, f.c.

- - - - -

Ĉu vi kredas ke....?

"Virina rideto pli kaptas ol reto."

"Pli bona estas kalva kape ol tute nenio."

"Karaktero sen talente pli ofte kondukis al sukceso, ol talente sen karaktero."

- - - - -

Kante: OTAVA KONGRESOVortoj: Frato Vianney Belduc, f.c.Aria: Oh! Susanna

1. Gaj' ni kunvenas en Otave,
Feliĉaj konatiĝi!
Sub simpatia prezidanto,
Ĝemikoj estas ni!

2. En Montreale, en Toronto,
Tririveroj, Rexhero,
Willowdale, King, Savinigano,
Vaterle kaj Kebeko.

Esperanto,
Vivu, vivu per ni!
Brilu, ĉiam, verda stelo,
En la ĉiel' super ni!

Tra Kanado,
Vivu, vivu per ni!
Vivu, ĉiam, Esperanto,
En la mondo, ĉirkaŭ ni!

3. Ja dank'al tiu samideal',
Povas interkompreni,
Kanadanoj diverskulturaj,
Ne ĝenataj tie-ĉi!

4. Nu, ni baldaŭ reiros hejmen,
Nova fajro en la kor',
Ekflamigante novajn kamen',
La movado kreskos for!

Esperanto,
Unueco per vi!
Brilu, ĉiam, verda stelo,
Kun amikec' inter ni!

Esperanto,
Vivu, vivu per ni!
Brilu, ĉiam, verda stelo,
En la ĉiel' super ni!

(JUN 64)

R I D U , G E S I N J O R O J !

k r u d e c e -

Pentristo, naturdotita per pli da pretendemo ol per talento,
alpaŝas artkritikiston:

-Kara amiko, vi iris al la ekspozicie?

-Kompreneble!

-Kaj vi vidis miajn pentraĵojn?

-Ĝe estas la selaj kiujn mi tre bone vidis!

Flatita, la pentristo fierigas, sed la alia perfide aldonas:
ĉar antaŭ ĉiuj aliaj staris persenoj!

n e n i o f a r e n d a -

-De 6 formetu 3, kio restas?

-Sinjero, mi ne scias.

-Vidu, vi havas ses pomojn, mi demandas tri al vi, kiom restas
al vi?

-Restas ses al mi.

-Sed ne, ĉar mi demandas tri pomojn al vi.


-Jes, sed mi ne ilia donas al vi.

e v i d e n t e c e -

Lisa: Petro, ĉu vi scias kio estas riverlito?

Petro: Certe, estas la leko kie kuŝiĝas la fiŝoj.

S-ino J.-M. Rondeau.



Solvoj en la venonta Alvoko

Horizontale

1. infirmile - subvesto, plej ofte tela.
2. interjekcio - Marie Albanie.
3. sufikso montranta la kolektiveson.
4. - denove - Prefikso signifanta ripeton.
4. Brutus mortigis lin - ferteke konstrui ion el ŝtonej aŭ brikoj.
6. moviĝi de iu loko al alia (apes.) - Kebeka Esperanto-Klubo - Kiemo de la tempo pasinta de post la naskiĝo - sufikso esprimanta per si mem la agon de la kaŭzo.
6. adverbo signifanta "en tiu loko - en ansere.
7. cifero - ricevi ion per ĝin uzi pagante interkonsentitan prezon - sufikso signifanta unu el la elementoj de tutaĵo.
8. adverbo uzata por anenci ion - prefikso esprimanta dividon.
9. prepozicio - en reptilioj - simila (apes.) - en urĝi.
10. artefarita hararo - karakterizata de parte de la sango. - en kiu naĝas blankaj kaj ruĝaj globetoj.

11. en epeke - en reostat@ - prefikso montranta la konecon de ambaŭ
12. en teni - Benedict Arnold. / seksej.
13. dekreti - tiu, kiu posedas, ordonas kaj disponas.

Vertikale

1. karakterizata per glacio - kapvesto.
2. sufikso signifanta unu el la elementoj de tutaĵo. - en legi.
3. en ozono - tempa adverbo - prefikso signifanta ripeton.
4. meti en pakon - vulkana eksputo.
5. en turo - denove - nea konjunkcio - prepozicio montranta lokon.
6. granda ŝtono (apes.) - prepozicio esprimanta celon.
7. de post - adverbo signifanta "ne pli ol" - sufikso esprimanta abstraktan ideon de kvalite aŭ stato.
8. en gastema - en sponge.
9. sufikso montranta inklinon - havanta ian aĝen. - en dalie - Battista
10. Pile de Jupitere (ak) - superas. (Alberti.
11. Eugene O'Neill - cifero - konjunkcio signifanta "kondiĉe ke".
12. Plurala prenomo - sufikso sen definitiva senco.
13. en obligacio - meble.

Diversaĵoj

- (1) Kun du literoj, mi estas la 14-a de la alfabeto.
 Kun tri literoj, mi estas membro de io.
 Kun kvar literoj, mi estas ankaŭ membro.
 Kun ses literoj, mi fariĝas membro de granda nacio
 Kiu estas mi?

- (2) Kun miaj kvar literoj, mi estas besto.
 Se vi dehakas mian kapon, mi eble fariĝas besto.
 Kiu estas mi?

(fratolino Ste-Marthe-de-Béthanie)

N I A U N U A K O N G R E S O D E E S P E R A N T O

F-inoj Atala Gingras, Marguerite Papillen, Marcelle Rousseau.

Ni ĵus revenas el nia unua Esperante-Kongreso, kiu okazis en Otaŭo, la 26-an de junio. Estas mirinda afero! Ni pevis konstati ni mem, kiel granda kaj profunda estas la dezire de Doktere Zamenhof, kaj ni ne pevis forgesi lin dum tiuj grandaj tagoj! Lia memore estis vivanta inter ni!

Krom ni, dek-unu esperantistaj gekebekanoj havis la saman plezuren! Ni velas neni nian prezidenton, s-ron Brunelle, niajn sindonemajn profesorejn, Fraten Vianney kaj s-ron Eugène Melansen. Nia grupo ankaŭ havis la grandan plezuren kaj honeron vidi Fraten Vianney prezidi la kunsidon! Ni aldonu kiom honoris nin s-re Beau-pré! Lia preleĝo interesigis nin kaj antaŭ ekceli la rezulton de la Oratora Konkurso, ni estis certaj, ke ili estus la venkonto.

Ni estus feliĉaj se ĝiu gekomencante havus saman ŝancon partopreni Esperantan Kongreson! Ni ne devas timi, pensante ke ni ne estas sufiĉe pretaj per tia Kongreso! Ĉar tiu helpas kaj entuziasmigas nin! Ni pevis konstati ke ni komprenis preskaŭ la tutajn preleĝojn, post nur ok lernadmenatoj. Ni estas des pli scivelemulinoj pri la Esperanta lingvo!

"Paevojaĝe", tiel ni nemas tiun belan aventuron! Este vere mirinda interkompreni kaj interkomaniki kun diversaj landanoj kaj precipe konstati ke ni estas ĝiuj fratoj en tiu granda kaj senlima mondo!

Ni nun estas avidaj partopreni nian duan kongreson kiu okazos en Kebeke la venontan jaron!

Vivu Esperante!

- - - - -

Teronte kaj Montreale vizitas Kebekon -

Je la unua de julio, s-ro Ken Price el Teronte kaj s-ro Paul Ronald el Montreale venis en nian urben. Ili estis gastoj de ges-roj Vincent Beaupré, kiuj, en tiu okazo, akceptis kelke da KKK-anoj. Estis tre agrable renkonte.

- - - - -

Ŝ a r a d e - (Solve en la venonta ALVOKO)

- Mia unua estas la fina litero de la nomoj.
- Mia dua estas prefikso per esprimi parencecon.
- Mia tria estas interjekcio.
- Mia tutajo estas almezo.
- Kiu estas mi?

de Fr-ino Ste-Marthe-de-Béthanie, s.g.q.